



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Julio : 3 2022

## LA VENDADO DE FORD-AŬTOMOBILOJ HALTIĜAS EN GERMANIO PRO JURA PROBLEMO

En la jaro 2015, la Eŭropa Parlamento submetis al regularo la teknologion *eCall*, laŭ kiu, ĉiuj novaj aŭtomobiloj vendotaj en la Eŭropa Unio devus disponi pri sistemo kun aŭtomata telefon-alvoko al 112, telefono uzenda en okazo de urĝo. La celo de ĉi tiu sistemo estas garantii pli efikan helpon al ĉiuj viktimoj de trafik-akcidentoj. Laŭ statistikoj, post akcidento, kiam la kuracista helpo alvenas tuje, la eblo supervivi al ĝi estas pli alta ol 60%. Do, la celo de tiu nova eŭrop-unia regularo estas, ke post kelkaj jardekoj ĉiuj aŭtomobiloj povos telefoni aŭtomate, do sen homa direktado, al emerĝa centro.

Por funkciigi ĉi tiun novan sistemon, la aŭtomobilo nepre devas havi propran SIM-karton. Tiel, kiam kelkaj sensiloj de la aŭtomobilo ekfunkcias, ekzemple aerkusenoj, la veturilo mem alvokas rekte la telefonon 112 kaj ĝi informas pri la ĝusta situo de la aŭtomobilo, do ankaŭ de la eblaj viktimoj. Kompreneble, por uzi tiujn SIM-kartojn, la fabrikantoj de aŭtomobiloj devas aboni la patentajn rajtojn de la fabrikantoj de tiuj kartetoj,



La teknologio pri aŭtomata telefon-alvoko de la aŭtomobilo okaze de trafik-akcidento sen-  
'dube malpliigos la nombron de viktimoj.

kiuj troviĝas ene de ĉiu portebla telefon-aparato.

Tiel, ok kompanioj, kiuj produktas tiujn komunikilojn, prezentis plendon en Germanio kontraŭ la aŭtomobila firmao *FORD*. Aliaj telefon-kompanioj en aliaj ŝtatoj jam subskribis akordon kun fabrikantoj de aŭtomobiloj por ĉesi la plendojn kontraŭ mon-kompenso. En Germanio same okazis, tamen neniu akordon oni atingis inter *FORD* kaj la japana kompanio *IPBRIDGE*, do la jura proceso daŭriĝis en Germanio.

Laŭ unua decido de la Munkena Kortumo, *FORD* devas haltigi la fabrikadon kaj vendadon de novaj aŭtomobiloj en Germanio. Post ĉi tiu

jura decido, praveblas akordo inter Tamen, ĝis tiam, neniŭ nova  
ambaŭ kompanioj por solvi eksterjur- aŭtomobilo FORD povos esti vendata  
instance la plendon, ĉar tio mem jam en Germanio.  
okazis rilate aliajn kompaniojn.

## *Vorto de la Semajno*

**Aŭkcio:** Procedo de vendo per publika konkuro, ĉe kiu la proponanto de la plej alta prezo akiras la vendataĵon.

**Aŭkci:** Vendi per aŭkcio.

**Aŭkciisto:** Komisiito, kiu direktas la aŭkcian konkuron.

**Aŭkia propono:** Oferto proponita de partoprenanto en aŭkcio, se tiu oferto reprezentas la plej altan prezon, la vendataĵo apartenos al proponanto de tiu oferto.

*Kadre de Universala Kongreso de Esperanto ĉiujare okazas aŭkcio de maloftaj kaj unikaj esperantaĵoj.*



***JURA SEMAJNO*** adiŭas ĝis la fino de la monato aŭgusto.

Ni informas al niaj karaj legantoj, ke dum la juli-aŭgustaj ferioj, nia bulteno ĉesos aperi. Ni revenos fine de la monato aŭgusto por informi al ĉiuj esperantlingvajn juristoj pri la plej ĵusaj juraj novaĵoj.

[jurista@esperanto.ac](mailto:jurista@esperanto.ac)